



# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno  
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : [lentzen@senlime.org](mailto:lentzen@senlime.org)**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

Esperantista Grupo de Verviers

BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe****[www.senlime.org](http://www.senlime.org)****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ  
januare, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio.La kotizo (10 € - denove deviga)  
estas disigita de la abono al la  
papera versio de nia informilo (12€).

## *Senlime* invitas vin al “renovigita” Zamenhof-festo la 20an de decembro je la 11h45

Post kiel eble plej agrabla trilanda renkontiĝo en Bonn (vidu la rememorigilojn afable pretigitajn de la lokaj organizantoj en paĝoj 4 kaj 5), kun bonega tagmanĝo en greka restoracio, ni jam nun invitas vin partopreni nian tradician Zamenhof-feston

- je dato interesa (kvankam decembro estas festoplena monato!)
- en la belega kadro de bonmanĝigema restoracio fama en **Vervierso** (“Le coin des saveurs“ [la angulo de l’gustumado])
- ĝuante la kutiman etoson kulturan kaj amik(ej)an
- en loko pli facile atingebla ol Kelmis (ne fore de la stacidomo, kun aŭtobus-haltejo kaj multaj parklokoj apude).

★ Detaloj sekvos en nia venonta informilo ★

Nepre **rezervu la daton** kaj retrovu nin en la restoracio« **Le Coin des Saveurs** », 28 av. de Spa, 4800 VERVIERS<http://www.coindessaveurs.be/>La gastejestro en **Select (Kelmis)** konas sep lingvojn, sed la

gastejestro en la angulo de l’gustumado lernis... esperanton !





# Niaj programeroj lupee

## detaloj pri anoncigitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

### Kio estas «energio» ?

La vorto energio devenas de la greka "**energeia**" kaj havas signifon "ago, agado". Ĝi estas komuna kvanto de la mezuro de diversaj mov-formoj de materio. Laŭ variaj fizikaj procesoj, en fiziko oni distingas specojn de energio: Elektroenergio, elektromagneta energio, gravita energio, kemia energio, mekanika energio, termika energio, nuklea energio. Alia distingo: renoviganta energio, fosilia energio, nuklea energio.

Rezulte de la ekzisto de Energikonserva Leĝo, la nocio "energio" interligas ĉiujn fenomenojn de la naturo. La senco de la energikonserva leĝo estas en tio, ke energio ne aperas el nenio kaj ne malaperas nenie; ĝi povas nur transformiĝi de unu formo de energio al alia.

Unu el filozofiaj doktrinoj, nome energetiko, rigardas la energion kiel fundamenton de ĉiuj naturokazoj. En pure praktika vidpunkto, energetiko estas scienco pri la energio kaj branĉo de la ekonomiko, kiu okupiĝas pri energetikaj rimedoj, ĝia prilaborado, transformo, transporto kaj uzo de diversaj specoj de energio... problemoj plej grava por la venontaj jaroj.

José **Jacob** (emerita profesoro pri biologio kaj nun energi-"produktanto!"), science pritraktos por ni tiun gravan problemaron kaj iliajn ekologiajn solvojn.

**09-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: "**Kio estas «energio»**", prelego de José Jacob.

### Per "Google Earth", ni vizitos vin hejme !

**Google Earth** estas programaro kiu montras la teron en 3 dimensioj per satelitaj bildoj. La programaro estis kreita de **Keyhole, Inc.** kaj aĉetita de **Google** en 2004.

Tri versioj ekzistas: senpaga versio, Google Earth **Plus** (\$20 /jaro) kun aldonaj aferoj, kaj Google Earth **Pro** (\$400/jaro) por komercaj uzoj.

Pluraj grandaj urboj povas esti sufiĉe detale observataj por individue distingi ĉiun konstruaĵon, domon, veturilon, eĉ piediranton... Kelkloke oni eĉ distingas detaletojn kiel kafo-tasoj en ĝardeno, koloro de la ĉemizo de ĉeestanto, k.t.p.

Didier Lousberg, kiu, dum alia prelego, jam montris al ni kelkajn famajn vidindaĵojn sur Google, ĉi-foje malkaŝos al ni ĉiuj la aspekton de niaj individuaj domoj, ĝardenoj, stratoj, kvartaloj...

Ne tro timu, ĝis nun la bildoj ne montras la «nunan momenton»: neniu do rimarkos ĉu vi ĉeestas aŭ ne kaj kion precize vi faras...

Sed certe iam eblos !

**10-16** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Google Earth : ni vizitos vin hejme**" (far' Didier Lousberg).

Pliaj informoj : <http://earth.google.com>

### Sabloskulptaĵoj ĉe la belga marbordo

Kiu, knab(in)o, ne konstruis konusan kasteleton el sablo sur unu el la plaĝoj de la belga marbordo ?

Kiom alta ? Malofte pli ol du metroj da alto ! Kial ? Pro la formo de la eroj de tiu marborda sablo. Ĝi ja ne taŭgas por konstrui fantaziaĵojn de 5-6 metroj da alto.

Tial necesas alporti tunojn da sablo havanta angulajn erojn. Tiuj krudaj materialoj estas malsekigitaj, premotaj, skulptotaj.

Malgraŭ la vento kaj la pluvo, la nedaŭraj verkoj, faritaj de fakistoj devenaj de pluraj landoj, konservas sian fortikecon dum du monatoj.

Tiel, la 20an de novembro, R. Demarche elektis centon da lumbildoj fotitaj ĉu en Zeebrugge ĉu en Blankenberge.

La kvar temoj estos :

- Romano (en 1999) ;
- La nigrhaŭta Afriko (en 2000);
- La dinosaŭroj (en 2001) ;
- Sudameriko (en 2003).

Arta, impona, mirinda !

**11-20** 19h30 BE-Kelmis, Sélect : "**Sablo-skulptaĵoj ĉe la belga marbordo**", prelego de Raymond Demarche, kun lumbildoj.

# ESPERANTO

## Eŭregiona kalendaro 2009 (1/2)



**Senlime** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** ([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

Pro la ferioj kaj internaciaj kongresoj, ni ne kunvenos en julio kaj aŭgusto.



**09-18** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Kio estas energio?**"  
(prelego de José **Jacob**).

**10-16** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Google Earth : ni vizitos vin hejme**" (far' Didier **Lousberg**).  
Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)

**11-20** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : "**Sablo-skulptaĵoj ĉe la belga marbordo**", prelego de Raymond **Demarche**.

**12-20** 11h45 BE-Verviers,  
"Le Coin des saveurs":  
**Zamenhof-festo de Senlime**  
(Amikejo provizore translokigita !).  
<http://www.coindessaveurs.be/>



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **01-15, 02-19, 03-19, 04-16, 05-21** kaj **06-18** (karaoke).

En raison des vacances et congrès internationaux, nous ne nous réunirons pas en juillet-août.



**18-09** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Qu'est-ce que l'énergie ?**" (conférence de José **Jacob**).

**16-10** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect: "**Google Earth : nous vous rendrons visite à la maison**" (Didier **Lousberg**).  
Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)

**20-11** 19h30 BE-Kelmis,  
Sélect : "**Sculptures de sable à la côte belge**" (conférence de Raymond **Demarche**).

**20-12** 11h45 BE-Verviers,  
"Le Coin des saveurs":  
**Zamenhof-festo de Senlime**  
(Amikejo déménagement provisoirement !).  
<http://www.coindessaveurs.be/>



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **15-01, 19-02, 19-03, 16-04, 21-05** et **18-06** (karaoke).

# BONN (memorigilo pri la TLR)



## Historio de Bonn

Bonn festis sian 2000-an naskiĝtagon en 1989, memorigante la starigon de romiana fortikaĵo en la jaro 12 a K.. Tamen jam setlis tie homoj pli frue. La plej aĝa skeleto trovita aĝas 14.000 da jaroj.

- ĉ. 1000 setlejo unuafoje nomita Bonn
- 1286 Bonn fariĝas urbo
- 1597 rezidejo de la Kolonja episkopejo
- 1723 Clemens August transformas Bonn al baroka rezidejo
- 1770 naskiĝo de Ludwig van Beethoven
- 1786 Fondo de la 1-a universitato
- 1798 Bonn apartenas al franca teritorio
- 1815 Bonn fariĝas prusa urbo
- 1818 Fondo de la prusa Friedrich-Wilhelm Universitato
- 1-a fervojo inter Kolonjo kaj Bonn
- 1845 Inaŭguro de la Beethoven-monumento okaze de la 1-a Beethoven-festo
- 1898 Konstruo de la 1-a ponto trans la Rejno
- 1918-26 Postmilita okupado
- 1945 usona, poste brita okupado
- 1949 provizora ĉefurbo de FRG
- 1990 Berlin fariĝas tutgermana ĉefurbo
- Berlin/Bonn leĝo – divido de ministerioj kaj financa helpo por regionala struktura ŝanĝo
- Bonn fariĝas UN-urbo
- 1999 ĉefurba translokiĝo de Bonn al Berlino
- 2002 Finkonstruo de la "Post-Tower", alteco: 162,5 m

## Stratkarto kun vizitindaĵoj

- 1 ĉefa stacidomo
- 2 ĉefa poŝtejo
- 4 Beethoven-monumento
- 6 "Sterntor"
- 9 malnova urbdomo
- 12 Beethoven muzeo
- 14 "Bröckemännche"
- 15 Operejo
- 16 Remigius preĝejo
- 19 "Münsterbasilika" [katedralo]





“Post-Tower” kaj UN-domo (iama “Langer Eugen”)



La parko “Rheinaue” – en la fono “Siebengebirge”



Museumsmeile – Arta ekspozicio kaj Arta Muzeo



Kastelo “Poppelsdorf”, iama ripozejo de Kolonja episkopejo



Münsterbasilika (katedralo)

Konstruita en la 11-a jc. sur iama kristana kultejo el la 3-a jc., la preĝejo “St. Cassius kaj Florentius” kaj la tombejoj de la urbpatronoj Florentius kaj Cassius. En la 13-a jc. transformita en gotika stilo. La okangula turo altas 81,4 m.

Originale la kastelo “Poppelsdorf” estis akva kastelo el la 14-a jc. Inter 1744-1756 finkonstruita far Clemens August en la stilo de Balthasar Neumann. Nuntempe la kastelo hejmas diversajn universitatajn institutojn, la mineralogian muzeon kaj la ĝardeno fariĝis fama “Botanika Ĝardeno”.



La naskiĝdomo de Ludwig van Beethoven

Bonngasse 20. En la modesta malantaŭa domo loĝis la muzikisto Johann van Beethoven kun sia familio. En tiu domo naskiĝis la plej fama filo de la urbo Ludwig van Beethoven.

**Aliaj «bonnaj» famuloj:** Adenauer, Arndt, Clemens August, Hertz, Kinkel, Lenné, Macke, Schlegel, Schumann Clara kaj Robert, Simrock



Beethoven-monumento, malantaŭe ĉefa poŝtejo

La poŝtejo troviĝas ĉi-tie ek de la jaro 1876 (iama kastelo Fürstenberg).

Dank’ al la klopodoj de A.W. Schlegel kaj F. Liszt la monumento estis starigita honore al Beethoven en la jaro 1845 far la skulpturisto Ernst Hähnel.

La inaŭguron ĉeestis la angla reĝino Victoria kaj la prusa reĝo Friedrich Wilhelm IV.

**Bonn-Pütchen:** La urbkvartalo Pütchen famas pro la kermeso “Pütchens Markt”, ĉiujare en la 2-a semajno de septembro. Dum sekega somero ĉ. 1000 p.K. la klerikino Adelheidis multe preĝadis kaj post kiam ŝi puŝis sian klerikan stabon en la sekan teron subite elfontis akvo el la tero. Ĝis nun fontas tie akvo el putro, kiun oni nomis “Pütchen” laŭ la latina “puteus”. Dum la jaroj tiu loko fariĝis pilgrimejo kaj merkato kun kapelo, preĝejo, trinkejoj, amuzejoj, renkontejo. La unuakermeso okazis en 1733.

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

## *Le Cercle musical de La Calamine interprète la marche d'Amikejo*

### Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob  
19 Chemin de la Rostibouhaye  
4910 POLLEUR (THEUX)  
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg  
25 Rue Pierre Fluche  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.M. Jacques  
5 Rue Joseph Wauters  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour  
l'Espéranto (A.P.E.)  
M. Delforge  
16 Rue des Glacières  
6001 MARCINELLE

### Cotisations

Les espérantistes et sympathisants  
sont cordialement invités à soutenir  
notre programme d'action en versant  
dès aujourd'hui l'une des cotisations  
suivantes au compte

n°: **000-0245571-64**

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB1

(Banque de la Poste)

de:

Esperanto grupo

25 Rue Pierre Fluche

BE4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est de  
nouveau obligatoire et fixée à 10  
EUR (l'abonnement à ce bulletin en  
version «papier» s'élève à 12 € en  
raison de l'augmentation des coûts).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2009 (EGV) 14 €**

**U.E.A. 2009 (MA) 59 €**

**Senlime** (cotisation 2010) **10 €**

**en indiquant le nom du membre  
cotisant, le bénéficiaire, l'année  
«cotisation de .... pour ....».**

On connaît le rôle important joué  
par la société "**Vieille  
Montagne**", fondée en 1837,  
dans l'exploitation de la mine de  
zinc tant convoitée et à l'origine  
de la "neutralisation" de l'actuel  
territoire de La Calamine. Cette  
entreprise de renommée  
mondiale créa en 1853  
l'"Harmonie de la Vieille  
Montagne", dont les activités  
devaient fleurir tout au long de  
l'histoire de Moresnet Neutre  
(Amikejo) pour cesser peu avant  
la deuxième guerre mondiale.

L'orchestre, qui atteignit très vite  
un niveau élevé, est à l'origine  
d'une longue tradition musicale à  
La Calamine. Peu après la  
guerre, quelques anciens  
musiciens et autres mélomanes  
se réunirent pour créer une  
nouvelle harmonie, l'actuel  
"Cercle Musical". Sa fondation  
officielle eut lieu le 15 juillet 1945.

Au début, le Cercle Musical fut  
conçu comme orchestre  
symphonique. Mais rapidement,  
les instruments à vent devinrent  
prédominants. C'est à partir de  
1948 que le Cercle Musical se  
convertit en harmonie. Il fallut  
énormément de dévouement et  
de patience pour réanimer la vie  
musicale et pour former de  
nouveaux musiciens. Malgré les  
difficultés, la réussite fut parfaite  
grâce à la camaraderie, la  
compétence et le dévouement  
des différents dirigeants.

En Monsieur Jean **Herzet**, chef  
d'orchestre de 1949 à 1987, le  
Cercle Musical avait trouvé un  
directeur énergique qui a conduit  
l'orchestre de succès en succès.

Ensuite, le niveau de l'orchestre a  
encore été constamment  
amélioré et le Cercle Musical  
occupe actuellement une place  
de choix parmi les harmonies  
amateurs du pays. Il répète le  
vendredi soir au Sélect, pendant  
les réunions de **Senlime**.

Depuis 2006 l'orchestre est sous  
la direction de Jos **Simons**. Né  
en 1965, celui-ci obtint entre  
autres un diplôme de musique de  
chambre/hautbois au Lemmens-  
institut de Louvain. Avec les  
ensembles de musique de  
chambre "Kalamotoi" et "Belcanto",  
il réalisa différents programmes  
pour "Radio 1" et "Klara" et  
enregistra deux CD. Comme  
compositeur et arrangeur il a  
transcrit des œuvres de **Mozart**  
et de **Pasculli**, dont un solo pour  
hautbois et orchestre d'harmonie  
qu'il a interprété lui-même avec le  
"Grand Orchestre des Guides".  
En collaboration avec Nadia  
**Loenders**, il composa l'hymne  
"Olympiade" pour l'émission de  
TV1 "Fata Morgana".

Fier de son passé, le Cercle  
Musical interprète régulièrement  
la **marche d'Amikejo** (composée  
par Willy **Huppermanns**), qui  
devait également servir d'hymne  
national pour le nouvel Etat  
indépendant de Moresnet-neutre.

Il se produit régulièrement en  
concert ou en cortège à La  
Calamine, par exemple : le 21  
juillet pour la fête nationale, le 9  
août dans la procession, le 15  
août pour les Tireurs St Roch, le  
31 août pour les sapeurs-  
pompiers, le 11 septembre pour  
l'ouverture de la kermesse et le  
11 novembre... le Carnaval !